

2a PASKA DIMANĈO - A - 23a de aprilo 2017

## **JESUO APERIS, DUM LA PORDOJ ESTIS FERMITAJ**

**Komento al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Johano 20, 19-31**

**Kiam vesperis en tiu unua tago de la semajno, la disĉiploj estis kune en la vespermanĝejo, kun pordoj fermitaj pro timo antaŭ la Judoj. Subite Jesuo venis, ekstaris meze de ili kaj salutis ilin: „Paco estu kun vi!“ Poste Li montris al ili siajn manojn kaj sian flankon. La disĉiploj ĝojis, vidante la Sinjoron. Denove Jesuo diris al ili: „Pacon al vi! Kiel la Patro sendis Min, tiel ankaŭ Mi sendas vin.“ Kaj, dirinte tion, Li elspiris sur ilin, kaj diris: „Ricevu la Sanktan Spiriton: kies pekojn vi pardonos, al tiuj ili estos pardonitaj; kies vi ne pardonos, al tiuj ili ne estos pardonitaj.“**

**Tomaso, nomata Didimo, unu el la dek du disĉiploj, ne estis kun ili, kiam Jesuo venis. La aliaj disĉiploj tiam diris al li: „Ni vidis la Sinjoron!“ Sed li deklaris: „Se mi ne vidos en liaj manoj la truojn de la najloj, se mi ne metos mian fingron tien, kaj se mi ne tuŝos per la mano la vundon de lia brusto, mi ne kredos.“**

**Post ok tagoj la disĉiploj denove estis tie, kaj ankaŭ Tomaso kun ili. La pordoj estis fermitaj. Jesuo aperis, haltis en la mezo kaj salutis: „Paco estu al vi!“ Poste Li diris al Tomaso: „Etendu ĉi tien vian fingron kaj rigardu miajn manojn; etendu vian manon kaj tuŝu mian vunditan bruston. Estu ne plu nekredema, sed kredanta!“ Tomaso respondis al Li: „Mia Sinjoro kaj mia Dio!“ Jesuo diris al li: „Vi kredas, ĉar vi Min vidis: feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis kaj tamen kredas!“**

**Jesuo faris multajn aliajn miraklajn signojn antaŭ siaj disĉiploj, kiuj ne estis skribitaj; sed ĉi tiuj estis skribitaj, por ke vi kredu, ke Jesuo estas la Mesio kaj la Filo de Dio. Se vi kredas je Li, pere de Li vi havos vivon.**

Kiam ni legas la evangelion, por kompreni tion, kion la evangeliisto volas transdoni, ni devas ĉiam distanciĝi de la tradicioj kaj precipe de la pentraj bildoj, per kiuj la artistoj intencis transrakonti ĉi tiuj epizodon. Jen la kazo de Tomaso, kiu ordinare estas prezentita, en la historio, kiel la nekredema, kiu metas sian fingron en la vundojn de la Sinjoro, en liajn manojn, kaj precipe en lian flankon, kiel, ekzemple, en la belega pentraĵo de Caravaggio, sed en la evangelio ni tute ne vidas tion.

Skribas la evangeliisto ke *"Tomaso, nomata Didimo, unu el la dek du disĉiploj"*, Didimo signifas "ĝemelo". El la kvar fojoj, el la kvar momentoj kiam aperas Tomaso en ĉi tiu evangelio, trifoje, kaj la nombro tri signifas "komplete", li estas prezentata kiel la ĝemelo, kies ĝemelo? Li estas la ĝemelo de Jesuo, ĉar li similas Lin en la sinteno. En apokrifajoj oni legas, ke "Tomaso estas nomata mia taŭga helpanto", sed kial li estas taksata la ĝemelo de Jesuo? Kiam Jesuo anoncis al siaj disĉiploj ke li volas iri al Judeo, ĉar Lazaro, lia amiko, mortis, ĉiuj disĉiploj timis, diris al Jesuo: nu, ĉu vi iras al Judeo, oni klopodis mortigi vin. Tomaso estis la ununura kiu diris: ni iru ankaŭ ni morti kun li. Dum Petro volis morti por Jesuo, kaj fine perfidis lin, Tomaso ne, Tomaso komprenis, ke oni ne fordonu la vivon por Jesuo, sed, kun Jesuo, oni fordonu la vivon por la aliaj. Pro tio Tomaso estas prezentata kiel la ĝemelo, tio estas, tiu kiu plej similas Jesuon, kaj lia graveco elstaras en ĉi tiu evangelio, ĉar lia nomo aperas sep fojojn. Do, *"nomata Didimo, ne estis kun ili"*, kial li ne estis kun ili? Ni legas, en ĉi tiu peco, ke la disĉiploj estis kun fermitaj pordoj, pro timo havi la saman sorton kiel Jesuo. Nu Tomaso, kiu estas la ĝemelo de Jesuo, ne havas timon morti kiel la majstro.

*"La aliaj disĉiploj tiam diris al li: «Ni vidis la Sinjoron!" Sed li deklaris: «Se mi ne vidos en liaj manoj la truojn de la najloj, nur de Johano ni scias, ke por krucumi Jesuon oni utiligis najlojn, "se mi ne metos mian fingron tien kaj se mi ne tuŝos per la mano la vundon de lia brusto, mi ne kredos»"*. Ĉi tiu aserto de Tomaso ne estu interpretata kiel absoluta neado de la resurekto de Jesuo, sed ĝi estas la deziro kredi, samkiel, en la itala, kiam oni anoncas al ni belan, eksterordinaran, neatenditan sciigon, ni diras: "Ni ne povas tion kredi!". Ne temas pri tio, ke ni ne volas kredi, sed ke ĝi ŝajnas tro granda; aŭ ni diras "Ne eblas, ne estas vere!", ni ne neas la fakton, sed ĝi estas tiel bela ke ĝi ŝajnas nebla. Do ĉi tie Tomaso ne neas la eblecon, sed li esprimas sian ardan deziron povi ĝin sperti.

*"Post ok tagoj"*, estas grava ĉi tiu indiko: la oka tago estas la tago de la resurekto de Jesuo, kaj la komunumo de la kredantoj lernis kunveni por la eŭkaristia celebros, *"la disĉiploj denove estis tie, kaj ankaŭ Tomaso kun ili. Jesuo aperis"*, pli ĝuste, laŭvorte, "venas", la verbo je prezenco indikas ke, ĉiufoje kiam la komunumo kunvenas, manifestiĝas la ĉeesto de Jesuo. *"La pordoj estis fermitaj. Jesuo aperis, haltis en la mezo"*, estas grava ĉi tiu indiko, kiun la evangeliisto jam prezentis, ke Jesuo, ĉiufoje kiam Li manifestiĝas al la siaj, sin lokas meze. Jesuo ne metas sin supre, ne sin metas kiel ĉeĉfo, sed je la centro. Kion ĝi signifas? Ĝi signifas ke ĉiuj ceteraj personoj ĉirkaŭ Li havas la saman rilaton, ne estas iu pli proksima al Jesuo kaj iu pli malproksima, iu antaŭe kaj iu poste, sed Jesuo estas meze en la centro, kaj ĉiuj aliaj ĉirkaŭe.

*"kaj salutis: kaj, por la tria fojo, Jesuo diras «Pacon al vi!»"*, ĝi ne estas bondeziro (en la greka originalo, Jesuo ne diras: "la paco estu kun vi" aŭ "Paco estu al vi", sed trifoje "Pacon al vi!"), ĝi estas donaco. Jesuo, kiam Li manifestiĝas, ĉiam donacas ĉi tiun pacon, nome la plenecon de la feliĉo kaj, kun ĝi, la donacon de la Spirito, kiu kapablas plilongigi, pere de la apostoloj, la amdonacon de la Patro al la homaro.

"Poste Li diris al Tomaso: «Etendu ĉi tien vian fingron kaj rigardu miajn manojn; etendu vian manon kaj tuŝu mian vunditan bruston. Estu ne plu nekredema, sed kredanta!»", nu, fronte al ĉi tiu invito de Jesuo, Tomaso tute evitas meti sian fingron en la vundojn de la Sinjoro, tute male, "Tomaso respondis al Li: «Mia Sinjoro kaj mia Dio!»", ĝi estas la plej alta proklamo de fido en ĉiuj evangelioj, do tute alie ol nekredema, Tomaso estas la perfekta kredanto. Johano estis prezentinta Jesuon kiel tiun, kiu estis la reveliĝo de Dio, kaj Jesuo, al Filipo, estis dirinta: "kiu vidis min, vidis la Patron", kaj, same Jesuo, estis dirinta: "Kiam vi levos la Filon de homo, tiam vi scios, ke mi estas", la dia nomo, nu Tomaso estas la unua el la disĉiploj kiu rekonas en Jesuo la plenecon de la dieco, la plenecon de la dia kondiĉo, "«Mia Sinjoro kaj mia Dio!»".

"Jesuo diris al li: «Vi kredas, ĉar vi Min vidis: feliĉaj» estas du feliĉproklamoj en la evangelio de Johano, strikte interligitaj: unu, en la lasta vespermanĝo, post la servo kiun Jesuo faris per la lavo de la piedoj, kiam Jesuo diras: "Vi estas feliĉaj, se tion vi faras", nome, se estas ĉi tia sinteno de servado, kaj la alia estas ĉi tiu, strikte kunligita: la sinteno de servado ebligas sperti Kriston resurektintan en sia vivo, «feliĉaj estas tiuj, kiuj ne vidis kaj tamen kredas!»". Tiuj kiuj, kun la paso de la tempo, sekvos, ne estas malfavorataj, sed kontraŭe ili estas feliĉaj, havas unu plian ŝancon. La mesaĝo, kiun donas al ni la evangeliisto, estas: ne estas necese vidi por povi kredi, sed estas necese kredi, aliĝi al Jesuo, tiel fariĝante signo, kiun la aliaj povas vidi.